# Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo) エスペラントよこはまのエスペラント文会報


## La 52-a Zamenhof-Festo, vid-al-vide post 2 jaroj

Kiel raportite en la oktobra n-ro, en la 18a de decembro (dimanĉe) de 12:30 ĝis 16:30 okazos la Zamenhof-Festo de Esperanto-Ligo de Kanagawa (ELK), en Tergloba Placo (Earth Plaza) de Kanagawa. La ĉefaj programeroj inkluzivas jenon.

- Raporto pri la montreala UK la lastan aŭguston, kaj pri la Azia-Oceania Kongreso, ĵus okazinta en Pusan, Koreio
- Movada seminario pri disvastigado de Esperanto
- Kanto-gvidado
- Vendado de esperantaj libroj, ktp.

## Venontjare, la 110a Japana Esperanto-Kongreso

Tiu kongreso havos ĉefan kongresejon en Kawasaki, urbo inter Jokohamo kaj Tokio, en la 21a kaj 22a de oktobro, 2023. Laŭ la plano de la Organiza Komitato, la kongreso okazos hibride, nome kaj ĉeeste kaj interrete. La ĉeesta parto okazos ne nur en la kongresejo en Kawasaki, sed ankaŭ en pluraj malgrandaj kongresejoj tra Japanio.

## EL NIA MUZEO

Nia Esperanto-Muzeo Jokohama estas iom post iom konata inter japanaj esperantistoj, kaj sporade vizitas neesperantistaj interesitoj. Jen kelkaj el ili en tiu ĉi jaro.

( ★ = esperantista, ● = neesperantista)

★ s-ro Terazima Tosio el Sakai, Gubernio Oosaka, emerita profesoro pri paco-studoj k.a. 2-foje vizitis nin. Li donacis al la muzeo kelkajn librojn.

● s-ro Gotoo Masatosi, emerita profesoro kaj ĵurnalisto, kiu felietone verkas pri diversaj muzeoj. Lia artikolo prezentanta la Muzeon aperis julie en semajna ĵurnalo nomata “Syuukan Sin-Kanagawa”.

★ s-ro Johannesa Ĝenberĝ el Svedio, la unua eksterlanda vojaĝanto vizitinta la Muzeon. Legu nian septembran n-ron pri lia impreso.

★ plumnome J-MENT, produktisto i.a. de “Amrilato”, komputila ludo utiliganta nekonatan lingvon por japanoj, kiu fakte estas Esperanto.

★ s-ino Yamamoto Yukiko el Nagoya, kaj s-ro Moriwaki Yasumasa, post la fino de la 109a Japana Esperanto-Kongreso en Hachioji, Gubernio Tokio.

★ ges-roj Isikawa Tieko kaj Isikawa Takasi, movadaj aktivuloj en Siki, Gubernio Saitama.

● 3 membroj de “Ĉeĥa Klubo”, japana grupo de ĉeĥ-amantoj, kun ĉefo s-ino Hayasi Satiko, kiu mem estas esperantisto. La grupo intencas reorganizi sin kiel jure aprobitan Ne-profitocelan Organizon kaj interŝanĝis opinion pri tio kun ni, kiu ja estas tia organizo.


Esperanto Jokohama

■ Eldonas NPO Esperanto Jokohama ■ Redaktas : Sibayama Zyun'iti, Noriko
■ Adreso: Nagatahigasi 1-19-1, Minami-ku, Yokohama-si, Kanagawa-ken, Japanio (JP-232-0072)
■ Redaktejo: tamtamo@eo-jokohama.bona.jp ■ TTT-ejo: http://www.esperanto.yokohama/
■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-i (Jokohama Esperanto-Rondo)

eseo

# Surgrimpi la monton Ĉomolungmo (Everesto)

**Mizro Iwaya**

Ĉomolungmo estas la plej alta monto en la mondo, kies alteco estas 8850 metroj super marnivelo. Multaj alpistoj celas atingi ĝian montosupron ĉiujare; kelkaj sukcesas kaj kelkaj ne. Lastatempe mi aŭdis ke fama skiisto Miura Yuuitiroo planis tion sed ne sukcesis pro doktora ĉesigo. Samtempe mi aŭdis ke lokaj gvidistoj surgrimpis ĝin por purigi la monton, ĉar restas multaj restaĵoj, eĉ kadavroj, sur la monto. Tio rememorigas al ni kiel malfacila estas la montoatako al Ĉomolungmo. Fakte la unua sukceso okazis en 1953 fare de novzelanda alpisto Edmund Hillary post amaso da antaŭaj malsukcesoj. Kiam oni demandis lin "Kial vi surgrimpas monton?", li respondis "Ĉar tie estas la monto."

Nun, la mondo suferas de la kronvirusa epidemio. Ĝia unua malkovro estis en decembro de 2019, en Vuhano, kaj ĝi kaŭzis grandan tumulton en la urbo. Ĝi vastiĝis tra la mondo kaj ankoraŭ ne malaperis nun, post tri jaroj. Sekve de tio, ni estis devigataj resti plejparte hejme. Ankaŭ Jokohama Salono ĉesis havi regulan kunsidon en interna ĉambro kaj ekhavis telekunsidon per komputilo. Tiamaniere tendencas en Japanio, ne en la mondo, ke ni ne havas sufiĉe da korpa ekzerco.

Mi decidis komenci korpan ekzercon fine de 2020. Oni kutime komencas promenadon por tiu celo. Sed ĝi ne plaĉas al mi ĉar ĝi bezonas tro multe da tempo. Krome ne troviĝas multaj vidindaĵoj ĉirkaŭ mia domo. Do kio estas la plej facila solvo de tiu problemo? Konsiderinte diversajn kondiĉojn, mi decidis surgrimpi la ŝtuparojn de nia apartamentaro. Mia domo situas sur la oka etaĝo. Unu etaĝo havas la altecon de ĉirkaŭ tri metroj. Do, sume ĉiukaŭ 21 metrojn da alteco havas mia apartamento. ( ∵ La oka etaĝo en japan-usona kalkulo situas super sep ŝtuparoj.)

Mi malsupren- kaj supreniras la ŝtuparojn, 21 metrojn altajn, unu fojon tage. Do mi atingas la altecon de ĉirkaŭ 3800 metroj en duono de la jaro. Ĝi estas la alteco de monto Fuĵi. Do mi surgrimpas monton Fuĵi en ĉiu duonjaro. Unu jaro akumulas la altecon de 7600 metroj. Ĝi similas al tiu de Ĉomolungmo. Do mi surgrimpas la monton Ĉomolungmo ĉiujare. Jam pasis unu jaro kaj duono post la komenco de tiu ekzerco. Tio signifas ke mi sukcese surgrimpis la monton Fuĵi trifoje, kaj monton Ĉomolungmo unu fojon kaj duone.

Ĝis kiam daŭros nuna epidemio? Kiom da fojoj mi surgrimpos la monton Fuĵi kaj Ĉomolungmon? Neniu scias krom Dio



(parto el foto en Vikimedio)